

## Di' naskiĝas, forto falas

BÓG SIĘ RODZI, MOC TRUCHLEJE • ADORU 233

1. Di' nas - ki - ĝas, for - to fa - las,  
faj - ro fros - tas, bri - lo pa - las,  
Mond - sin - jo - ro nu - de tre - mas;  
Sen - fi - nu - lon li - moj te - nas:  
Fil' de l' glo - ro en mi - ze - ro;  
Vi - von Mor - to jam stran - go - las.  
*refreno:*  
1.-4. Vort' kar - ni - ĝis sur la te - ro,  
in - ter ni kun - lo - ĝi vo - las.

2. Kio grandas pli ol tero?  
Di' rezignas Sian ĝojon.  
Ne plezuro, sed sufero  
sekvas Lian homan vojon.  
|: Por nin savi de l' kolero  
kiel pek-ofer' Li rolas.  
Vort' karniĝis sur la tero,  
inter ni kunloĝi volas. :|
3. Li, en povra stal' naskito,  
trogon havas, ne lulilon.  
Brutoj staras ĉe la lito,  
fojno kovras Dian Filon.  
|: Malriĉuloj kun sincero  
Lin salutas, Li konsolas.  
Vort' karniĝis sur la tero,  
inter ni kunloĝi volas. :|

4. Levu manon, Di-infano,  
nian karan landon benu,  
ke konsil' al ni kaj sano  
kaj per Vi bonfarto venu.  
! : Vi fortigas en espero,  
kiam Vi al ni parolas.  
Vort' karniĝis sur la tero,  
inter ni kunloĝi volas. : !

BÓG SIĘ RODZI, MOC TRUCHLEJE • ŚK 30 • M: ĉe Michał Marcin  
Mioduszewski, Kraków 1838-1853 • pola T: 18a jarcento ĉe Franciszek  
Karpiński • E: 1985 en NV 111\* • 2001 en ADORU 233

*La ripetado de la dua duono estas fakulativa.*

*<https://www.youtube.com/watch?v=TmgNIWwzNm4>  
(2020-12-18)*